Universala Esperanto-Asocio

**LABOROJ ĉe ILEI**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

Estrara Komuniko EKO 2016-23, pretigita en Nyiregyháza, Hungario, la 8an de aŭgusto.

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj, iuj AMO-partoprenintoj kaj unuopuloj.*

## Tri laborkunsidoj, unu post la alia

Pri la Konferenco de ILEI ĵus okazinta en Nyiregyháza, Hungario, ni ne raportos, ĉar nia Instruista Ligo jam detale faris tion. Tiu evento havis sian laboran flankon, kiu inkluzivis tri sinsekvajn kunsidetojn tra la ĵaŭda posttagmezo, rekte gravajn por la interesoj de UEA.

La lastaj du kunsidoj atestas la bonan kaj proksiman kunlaboron inter UEA kaj ILEI.

### 1. Laborkunsido pri la pretigata retejo <Aktivulo.net>

Partoprenis Dima Ŝevĉenko, la vicprezidanto de UEA kaj (parte) Anna Striganova. Konsentitaj la necesaj paŝoj por povi publike malfermi la novan retejon. La pli facilaj eroj pretos ĝis la fino de aŭgusto. Ŝlosila estas la detala parto de la paĝaro pri Aktivula Maturigo, kiu prezentos liston kaj bazajn informojn pri ĉiu okazinta kaj okazonta AMO-seminario, kune kun ligo al paĝo por ĉiu unuopa seminario. Tiu paŝo bezonas plian programadon, por ebligi tion UEA devigas sin liveri kiom eble plej kompletajn materialojn por minimume du seminarioj, por ke la nova arĥitekturo estu testebla. Konsentite pri reformo de la ĉefmenua sistemo por aldoni falmenuojn, kio permesos aldoni pliajn temojn. Ĝis nun la retejo havas nur pasive legeblajn erojn, sed interaktivaj elementoj estos aldonataj, ĉar la arĥitekturo permesas tion. Celita publika malfermo en oktobro, sed plukonstruaj laboroj daŭros multajn monatojn post tio. La retejo estas konceptita, tiel, ke ĝi plene integriĝu en la plene novan asocian retejon.

### 2. Laborkunsido pri Jaro de la Lernanto

Aldoniĝis al la laborgrupo pri la Jaro du pliajn membrojn, Ivan Colling (BR) kaj Zsófia Kóródy (DE). Membro kaj estrarano Elena Nadikova (RU) pretigis detalan tabelan realigoplanon, plue traktatan en la grupo. Aldoniĝas al la listo de eventoj kvar novaj eroj, iuj certaj, iuj esploritaj; la plena listo sekve ampleksas 14 eventojn en ĉiuj kvin kontinentoj. Serio da artikoloj en la juli-aŭgusta numero de revuo *Esperanto* prezentos la celojn kaj planojn por la Jaro (parte jam senditaj rete al la ricevantoj de EKO-komunikoj ĉ. la 20a de julio). Konsentite, ke la ĉefa retejo de la Jaro aperos ĉe la baldaŭ lanĉota retejo de UEA <Aktivulo.net> sed la retejo de ILEI <ilei.info> prezentos bazajn informojn; la du retejoj referencos unu la alian. Diskutite pri Filmkonkurso, kiun pretigas ILEI, ankaŭ pri adekvata financado de la jaro.

### 3. Kunsido pri Universitata Agado

Kunsidis sepo da aktivuloj en la kampo, pluraj el ili membroj de la Universitata Komisiono de ILEI. Esprimitaj kelkaj duboj pri la starigo de komuna komisiono de UEA/ILEI/CED, kiu havus subtenan kaj kunordigan rolojn, tute ne ordondonan. Se stariĝos ĝi funkcios egalnivele kun tiu de ILEI kaj la du proksime kunlaboros. Skizitaj kelkaj taskoj plenumindaj, plej urĝa estas ampleksigo de la informoj en <edukado.net> pri universitatnivelaj kursoj kaj agado. La kunsido aŭdis pri nova oferto en la universitato UAM en Poznano, Pollando, pri dujara programo de magistraj studoj, pri kio ni raportos pli komplete en estonta EKO-komuniko.

## La estraro de ILEI kunsidis dum tri pliaj tagoj



Partoprenis la konferencon 6 el 7 estraranoj – la sepa devis manki pro vizaj kialoj. Partoprenis observantoj de UEA kaj TEJO. Por ŝpari vojaĝkostojn, ILEI organizis estrarkunsidon tuj post la Konferenco. Foto: SMG. Sekvas resumaj notoj el la diskutoj.

### 1. MITE (Modulara Instruista Trejnado en Esperanto) – kun Zsófia Kóródy

La projekto revivigita kun alia emfazo ol origine planita ekde 2011. La emfazo nun estos reta trejnado, kun ĉeestaj elementoj, eblaj en kelkaj mondpartoj. La retejo grandparte pretas, sub gvido de Germana Eo-Asocio/-Instituto, kunlaboras ILEI, espereble UEA.

### 2 Junularo kaj TEJO – kun la observanto de TEJO, Michal Matúšov.

**2a Instruista Trejnado:** ebloj aldoni tion al la subvenciprogramo ĉe TEJO kaj EU. ILEI foje iĝu partnero, kunordiganto aŭ almenaŭ kunlaboru. TEJO difinu pli precize la postulojn, taskaron, financajn implicojn pri partnereco aŭ la kunordiga rolo. En la nuna akceptita projekto de TEJO kun po 4 eŭropaj kaj 4 afrikaj landoj, ILEI kunlaboru (do sen formalaj devoj). Planataj estas novaj projektoj EU-Azio kaj EU-Ameriko, en kiuj pli forta engaĝo de ILEI eblos. Kadre de kunlaboro, ILEI vidas dezirinda reveki la trejn-programon "Flugiloj".

**2b Partoprenigi junulojn en ILEI-konferenco:** TEJO pretas pagi la aliĝkoston (unua periodo) por elektitaj junuloj en Konferenco de ILEI. Ĝi tion faras sentante la deziron, ke pli da junuloj akiru instrukapablojn. ILEI havas rimedetojn moderigi por la elektitoj la loĝkostojn.

**2c Junulara programo** ene de ILEI-konferencoj: La interkona frandvespero jam bonas, ekestu ekz. karaokeo, gufujo, dancado, vigla kvizo ktp. ILEI konsentas. TEJO kaj ILEI kunlaboru.

**2d Junaj instruemuloj** havu eblojn ekzerci siajn kreskantajn kapablojn, ekz. pere de gvido de modellecionoj en la ILEI-Konferenco (ekde Koreio "Kongreso"). En kongresoj estu ebloj por 10-minutaj intervenoj, suplemente al la tradiciaj 45-minutaj prezentoj.

### 3. Pliaj temoj

Pritakso de la ĵusa Konferenco, preparoj por la 50a Kongreso en Busano, Seulo, ideoj por 2018, precizigo de estraraj taskoj, lertigado de instruistoj, financo, eldonaĵoj, reta strategio por la Ligo, regularaj renovigoj kaj decidoj pri estontaj estrarkunsidoj fizikaj kaj perskajpaj.

Raportis: Stefan MacGill (UEA), Mirejo Grosjean (ILEI), Nyiregyháza.

Vortoj 805

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...